# Kiam oni uzas la prepozicion **da?**

**Da – la kvanta prepozicio post kvantaj korelativoj, kvantaj adverboj, kvantaj substantivoj.**

**Da** prepozicio estas uzata por enkonduki substantivon:

1. **post kvantaj korelativoj**
   *kiom, tiom, iom, ĉiom, neniom* - **da...**
   Ekzemploj:
   Li donis al filo **iom da** mono.
   Ili havas **neniom da** pano

   Ekzerco: Skribu po unu frazo kun tiuj korelativoj kaj **da**

2. **post kvantaj adverboj:**
   *multe, pli, sufiĉe, tro* ....**da**

   Ekzemplo:
   Ĉu vi havas **pli da** tempo?

   Ekzerco: Skribu po unu frazo kun tiuj adverboj kaj **da**

3. **post kvantaj substantivoj:**

   Ekzemploj:
   Amaso **da** homoj.
   Botelo **da** vino.
   Sako **da** mono.

   Ekzerco: Skribu kelkajn frazojn kun kvantaj substantivoj
   kaj prepozicio **da**.

********

Oni **ne uzas** la prepozicion **da** post **kvantaj adjektivoj**:

Ekzemploj:

multaj personoj
kelkaj aŭtoj
amasa kunveno
sufiĉa pago
pluraj vortoj
plia laboro